

Lige kun tio necesas memori, kontraste, la vortojn de *Bazarov* el la fama romano de *I.S. Turgenev* "Patroj kaj filoj": "La naturo ne estas katedralo, sed ateliero, kaj la homo estas laboristo en ĝi". *Turgenev* montras en la romano la esencon de la socio vivanta laŭ la ideoj de la ekonomia raciismo: la nihilismo kiel neado de la Diecaj bazoj, strebanta starigi utilec-raciajn aŭ konsumajn rilatojn en la socio.

La titolo mem de la romano ekhavis en la rusa kulturo profundan spiritan sencon. La kristana filozofo *N.F. Fedorov* (1828-1903) skribis pri la malmoraleco de la teorio de racieca progreso, kiu baziĝas sur la strebo, krei bonstaton kaj prosperon je la konto de senkoreca rilato al la pasinto: "...necesas vivi ne por si mem (egoismo) kaj ne por aliuloj (altruismo), sed **kun ĉiuj kaj por ĉiu**: ĝi estas la komuno de la vivantoj (filoj) por revivigi la mortintojn (patrojn)".⁽¹⁰⁾

Konklude ni povas diri, ke la nocioj **religio, familio kaj ekonomio** estas forte kunligitaj. En la diversaj historiaj periodoj la rolo de familio kaj religio ŝanĝiĝis, atribuante al la mastrumado pli aŭ mapli altan gradon de utilismo. La kompara analizo de tiuj du vortoj en kromtekstoj de la rusa kaj franca kulturoj permesas precizigi ilian sencan enhavon en la pasinteco, sed ankaŭ pliriĉigi nian ideon pri ilia nuntempa semantiko.

Notoj

- (1) *Bulgakov S.N.* (1994). *Nevespera lumo*. Moskvo, p. 309
- (2) *Ibidem*. p. 305
- (3) "*Dictionnaire général*" (1993). *Larousse*, p.511
- (4) *Florenskij P.A.* (1989). "Termino" II. Ĝenerala lingvoscio, n-ro 3
- (5) *Mejendorf I.* (1990). "Bizanco kaj Moskva Rusio", Parizo, p. 103
- (6) *Ibidem*. p.420
- (7) *Berger-Longuet P.* (1998). "*Sciences économiques et sociales*", Parizo, pp.13-14
- (8) *Beltrame P.* (1979). "*Les systèmes fiscaux*", p. 20
- (9) *Bulgakov S.N.* (1994). "Nevespera lumo", Moskvo, p. 317
- (10) cit. laŭ *Losskij N.O.* (1991). "Historio de la rusa filozofio", Moskvo, p. 108

Adreso de la aŭtoro

D-rino *AFINSKAJA Zoja*
 prospekt Mira 129, kv. 62
 129226 – M o s k v o / RUSIO

Priaŭtoro informo

La aŭtorino estas doktoro pri filologiaj sciencoj kaj docento ĉe Moskva Ŝtata Universitato.

Scienca eĥo

La plej granda vivulo de la mondo*

Eĉ de la Luno estas perceptebla la Granda Bariera Rifo (*Great Barrier Reef*) – rifo de la granda kiel Britujo kaj konsistanta el miliardoj da koraloj, kie vivas pli da animaloj ol ie ajn en la mondo. Kvazaŭ "oka mondmiraklo" la Grandbariera Rifo naskiĝis antaŭ 18 milionoj da jaroj el la skeletoj de tielnomataj koralpolipoj. Tiuj bestetoj kreskas dum sia vivodaŭro al nuraj 10 milimetroj, sed pro la eterna ciklo de vivo kaj morto tavoloĝas tra periodo de jarmilionoj koralejoj de giganta amaso. Laŭ sciencaj analizoj ŝajne inter periodo de 30 ĝis 100 jaroj mortas kaj denove estiĝas tutaj koralbaroj.

Jaĉ en la jaro 1975 la Rifo ricevis la statuson de Nacia Parko: marmontara ekspluatado kaj nafto-borado estis malpermesataj, sportado kaj la kaptado de akvariaj fiŝoj estis ligitaj kun altaj kostoj. Kelkaj regionoj estas fermitaj por la publiko kaj alireblaj nur por esploristoj. La plimulton de la insuloj oni ne rajtas surpaŝi, ĉar ili estas dokumentitaj protektejoj por bestospecioj minacataj de forpereo. Krom la granda foceno aŭ "marporco" (*Phocæna*) ankaŭ aliaj el la grupo de la malgrandaj dencetacoj (kiel ekz. la makulita kaj la blankflanka foceno kaj la blankbuŝaj delfenoj) estas enloĝantoj de tiu mara regiono ĉirkaŭ la plej granda koralrifo de la mondo.

Giganta ekosistemo kun propraj vivoleĝoj

Oni imagu – viva kreitaĵo de la granda de Britujo! Vivulo, kiu spiras, kiu havas animon: en mondo kolorplena kiel ĉielarko, pli fascina kaj pli bela ol ĉiu alia tera pejzaĝo. Tiu ĉi vivulo estas la Grandbariera Rifo, kiu etendiĝas pli ol 2000 kilometrojn laŭlonge de orienta marbordo de Aŭstralio: ĝi konsistas el 2900 unuopaj rifoj kreskintaj el la kalcitaj konkaj skeletoj de milion-milionoj da nanaj marbestetoj. La averaĝo de kreskado estas 1 cm jare – nur la koraloj el la genro akroporo (*Acropora*) sukcesas al rekorda prosperado de 26 cm. Intertempe estas konataj 350 diversaj koralospecioj - pli multaj ol en iu ajn alia loko de la mondo. Estiĝis formacioj, kiuj aspektas kiel Afrikaj arboj – kun etendiĝantaj kronoj kaj dikegaj trunkoj. Ili estas akvarandaj kiel tabloj, majestaj, kovritaj de mola substanco - same kiel la basteca kornaro de cervo, rondaj kiel fungoj aŭ disbranĉe sulkitaj kiel homa cerbo.

* Televida dokumentado de *Westdeutscher Rundfunk (WDR)* kadre de la scienca elsend-serio "Subakvistaj paradizoj de la Mondo" (*Taucherparadiese der Erde*)

Specioriĉa kiel la Amazonaj praarbaroj

Ili lumas ruĝe, blue kaj verde – buntega pejzaĝo, en kiu vivas 2000 fiŝospecioj kaj 4000 specioj de maraj limakoj: aldoniĝas smeraldo-koloraj konkegoj, pezantaj centojn da kilogramoj, ŝarkoj, testudoj, kobaltbluaj marsteloj kaj ruĝaj markukumoj – post la amazonaj praarbaroj la plej specioriĉa regiono de la mondo. Ne jam estas finita la esplorado de la regiono. Antaŭ 6 jaroj sciencistoj prognozis forpereo de la rifo ĝis la jaro 2000 pro plialtigita nitrogena enhavo de la maro, grandskala mara fiŝkaptado, ekesto de la korala paliĝmalsano kaj amaso da dornkronaj marsteloj. Novaj analizoj tamen konfirmas la kontraŭon: fakte nur 25% de la origina rifo estas damaĝitaj kaj novaj koralkreskaĵoj anstataŭas la oldajn – la morto montriĝas kvazaŭ kiel natura vivoritmo.

La 600 teraj kaj 71 koralaj insuloj en tiu ĉi regiono (el kiuj ĝis hodiaŭ pli ol duono eĉ ne portas nomon) tamen estas kaj restas stranga sekreto. Nur 24 el ili estas malfermaj por la 700 000 turistoj ĉiujare alvenantaj. Temas parte pri landmakuloj sen iu ajn vivo aŭ vegetaĵo – oraj marbordoj kreskintaj malpli ol 1 m altaj el la oceano.

Sed aliaflanke ekzistas insuloj surkreskitaj de pluvarbaro kaj ombreataj de nealireblaj montoj – insuloj, kiuj portas nomojn kiel “Tagreva Insulo” (*Daydream Island*) aŭ “Verda Oazo” (*Dunk Island*) – nomitaj de la indiĝenoj “Insuloj de Paco”. La 71 koralinsuloj ne havas nomojn. Legendo diras, ke ili ne estas faritaj por la eterno – kaj fakte kelkaj malaperas post la ĉiujaraj furiozaj ŝtormoj, kvazaŭ neniam ekzistintaj.

Sed tamen: tiu ĉi unika pejzaĝo restos viva, spite al ĉiuj ventegoj, ŝtormoj, uraganoj. Ĉar la insuloj certe reaperos – iam estonte, eble en jarmilionoj. La Grandbariera Rifo ne mortas – ĝi nur nove kaj daŭre, kreiĝe kaj renaskiĝe sin mem restarigas. sa

Roboto por foliumi

Novspeca "skanografia roboto" tiom granda kiom ĵipo (la ĉiaterene uzebila usona aŭtomobilo) kapablas memstare foliumi librojn de ĉiuj formatoj, kaj tiumaniere ciferkode prilabori la enhavon de pli ol mil paĝoj dum tempodaŭro de nur unu horo.

Ĝis nun la enorma leg-rapideco de modernaj skaniloj nur malmulte helpis por turni la foliojn de libroj kaj periodaĵoj: ĉar ĉe tiuj oni tamen devis movi – per mano! – paĝon post paĝo, antaŭ ol la elektro-

nika legilo povis daŭrigi sian laboron. Pro tio, kelkaj bibliotekoj kiuj volas oferti siajn librotrezorojn tutmonde per la interreto, kunlaboras kun specialaj firmaoj en Hindio kaj Filipinoj, kie – pro minimuma laborpago por salajruloj – la prilaborado de libro kostas nur 1 ĝis 4 dolarojn. Sed por tio la (ofte multvaloraj) foliantoj ja devas estis sendataj preskaŭ ĉirkaŭ la tutan mondon, kaj sendi kopion de libro certe estas pli sekure...

La novspeca elektronika "librofoliumsklavon" disvolvis la firmao *4DigitalBooks* en *St. Aubin*, Svislando. La uzado de la maŝino tamen nur tiam estas ŝpareme ekonomia, kiam oni volas ciferkode prilaboradi pli ol 5,5 milionojn da paĝoj. (Fonto: "Der Spiegel" 21/2003, p.174)

Salmoj kiel sterko

Sekve de troa fiŝkaptado kaj konstruado de akvobaraĵoj ĉiam malpli da sovaĝaj salmoj atingas sukcese siajn frajlokojn en la fontoregionoj de nordamerikaj riveroj. Usonaj biologoj de Vaŝingtona universitato nun estas eltrovintaj, ke pro la forrestado de la fiŝoj suferis la energikaj nutrajociklo por dekduo da bestospecioj, inter ili ursoj kaj lutreoloj. La restaĵoj de mortintaj fiŝoj en la t.n. "salmotombejoj" aldone provizas konsiderindan nutromaterialon por la sovaĝa bestaro kaj sovaĝplantaro en la proksimeco de riverbordoj. Junaj salmoj ekz. manĝas la kadavrojn de mortintaj samspeculoj aŭ predas sur la salmaj ovaroj; troveblas ankaŭ nutrosubstancoj ellavitaj el fiŝkadavroj en apudbordaj arboj kaj arbustoj.

Tiu natura vivociklo estas, laŭ la esploristaj eltrovoj, vaste nedifektita ekz. en la akvaĵoj de Alasko: tie ĉiujare estiĝas nova vivo el la ĉiujare milionobla salmomorto. Alarma, aliflanke, estas la situacio en la usonaj ŝtatoj Vaŝingtono kaj Oregono: tie la riveroj kaj riverproksimaj regionoj averaĝe ricevas nur 6% de la nutrosubstancoj, kiujn ili ricevadis antaŭ cent jaroj pro la regula celdirekta migrado ĉiujara de la maraj salmoj por demeti sian frajon proksime al la enlandaj dolĉakvaj riverfontoj. (Fonto: "Der Spiegel" 21/2003, p. 174)

Magra druido

La NPIVa difino sub "druido" estas iom magra informo: "pastro ĉe la antikvaj keltoj". Eĉ la Esperanta versio de "Asterikso" jam donas pli da scio pri tiu profesio, kiu en la antikva Keltujo fakte estis unu el la plej malfacilaj klerig-trejnadaj por la koncernaj kandidatoj. Kiel